Norvega Esperantista Ligo

Jarraporto 2010

(traktota en la landa kunveno 2011)
(La etliteraj teksteroj estas citaĵoj el la laborplano 2009–2011.)

A. Ekstera informado

Amaskomunikiloj

La estraro prioritatas havigi priparolon pere de la amaskomunikiloj, ekzemple tiel:

- dissendante gazetarajn komunikojn pri novaĵoj
- instigante la klubojn informi lokajn amaskomunikilojn kiam okazas io interesa

Dum 2010 registriĝis neniu intervjuo aŭ artikolo pri Esperanto, sed 1 letero de leganto kaj 5 noticoj kaj aliaj mencioj.

Interreto

La estraro prioritatas la retpaĝojn de NEL, tiel:

- certigante, ke www.esperanto.no havu redaktoron kiu respondecu pri konstanta ĝisdatigado
- prizorgante, ke informoj pri Esperanto ĝenerale, pri kursoj kaj aktualaj eventoj kaj pri havebla literaturo estu troveblaj rete

Ni uzis nian propran servilon, situantan en la oficejo de Jardar E. Abrahamsen, kiu respondecis pri ĝi kaj teĥnike kaj enhave. La servilo havas kaj retpaĝojn kaj retpoŝtan sistemon.

Niaj retpaĝoj enhavas ampleksajn informojn pri Esperanto norveglingve, liston de kontaktpersonoj, kaj informojn pri aĉetebla literaturo, aranĝoj ktp. Oni afiŝadas la estrarajn protokolojn de NEL, kvankam ĝ uste en 2010 okazis grandaj malfruiĝoj pro la laborkapacito de la responsulo.

Krom tio ne okazis ĝ isdatigoj de la enhavo de la retejo, parte ankaŭ pro manko de novaĵoj.

NJE havas siajn retpaĝojn en aparta servilo, kie publikiĝis ĉiu numero de *Inter Ni Dirite*. La paĝaro de NEL ligas al la paĝaro de NJE.

- konsiderante ĉu NEL ĉeestu en aktualaj retsocioj

NEL havas konton ĉe Twitter (@esperantonytt), sed ne uzis ĝ in en 2010, parte pro malmulta aktivado, parte pro okupiteco de la homoj.

- ofertante helpon al aliaj organizoj kiuj deziras krei retpaĝojn en Esperanto

La estraro ne prioritatis tion pro manko de homfortoj.

Informbudo/prelegoj

La estraro memorigas la membrojn pri:

- vizitoj en lernejoj kaj organizaĵoj por informi pri Esperanto
- informbudoj kaj disdonado de informiloj surstrate aŭ ĉe foiroj, ekz-e studentaj tagoj, lokaj kulturaj eventoj, internaciaj aranĝoj kaj simile
- la neceso ke ĉiuj informoj estu sobraj kaj precizaj

En Oslo oni starigis informbudojn, unu el ili en periodoj plurfoje semajne. La klubo de Tromsø havis informbudon kaj prelegon dum *Internasjonal uke*.

Informado en la norvega

La estraro prioritatas eldoni informojn pri Esperanto en la norvega, ekzemple aktualajn broŝurojn.

La estraro decidis eldoni novan faldfolion, sed ne havis kapaciton plenumi tiun decidon en 2010.

Informpetoj

Venis manpleno da informpetoj dum 2010.

B. Instruado

Ĉeestaj kursoj

La estraro ĉiujare instigas, kaj se necese helpas plifaciligi, ankaŭ ekonomie, ke lokaj kluboj aranĝu kursojn por novuloj.

En 2010 okazis kurso por ĉ. 5 personoj en Tromsø. En Trondheim okazis kurso por jamaj membroj.

Interretaj kursoj

La estraro prioritatas, ke vizitantoj al niaj retpaĝoj facile trovu altkvalitajn interretajn esperantokursojn.

En la TTT-ejo estas ligiloj al la plej aktualaj kursoj. Pluraj membroj de NEL aktivas pri kursoj kiel lernu.net, sed la estraro mem ne okupiĝis pri la afero.

Al plenumintoj de kursoj la retpaĝoj de NEL atentigas pri la konstanta oferto de la legaco Uhlen pri subvencio al junuloj por ilia unua internacia Esperanto-aranĝo. Kursanoj konataj al ni ricevu ankaŭ oferton pri membreco.

Ankaŭ en 2010 NEL ne ofertis akompananton, sed la legaco Uhlen daŭre havas paĝon en nia retejo.

Ekzamenoj

La Ekzamena Komisiono konsistas el Otto Prytz (prezidanto), Gunleik Bergrud kaj Karl Johan Grønning. La komisiono ne aktivis en 2010. Per ligo en la hejmpaĝo de NEL estas rete konsulteblaj: la ekzamena regularo, la programo por la Elementa Ekzameno, kaj la programo por la Meza Ekzameno.

Instruantoj

La estraro prioritatas subtenon al membroj kiuj deziras lerni instruadon de Esperanto.

Okazis neniu pedagogia kurso en 2010.

Faksekcio de instruistoj

La faksekcio ankoraŭ ne estas revivigita. La peradon de la norvegaj ILEI-kotizoj kaj la mastrumadon de la konto de la instruista sekcio prizorgas la kasisto de NEL, Anne Karin Bondhus.

C. Kontakto kun la kluboj kaj membroj

Kluboj

La estraro tenas kontakton kun la kluboj kaj ofertas/interŝanĝigas ideojn por ilia aktivado.

La estraro esploras la eblecon oferti specialajn favorojn al la membroj.

Tiuj taskoj ne prioritatiĝis dum 2010.

Seminario

La estraro prioritatas aranĝi seminarion por la membroj dum jaroj kiam ne okazas landa kongreso.

Ni rezignis pri seminario en 2010. La kapacito de la estraranoj suferis precipe pro malsano, sed ankaŭ pro salajrata laboro kaj privataj aferoj, kaj ni agnoskis ke ni devas uzi niajn limigitajn fortojn por preparado de la Landa Kongreso en 2011.

Norvega Esperantisto

La estraro prioritatas labori por

- eldonadi *Norvega Esperantisto*

Ankaŭ dum 2010 nia membrogazeto *Norvega Esperantisto* donadis al la membroj la plej gravajn informojn.

La jarkolekto 2010 konsistis el 6 numeroj kun po 16 paĝoj, krom unu kun 28 paĝoj.

Redaktis Douglas Draper; enpaĝigis Douglas Draper kaj Judith Parelie Abrahamsen (bildojn kaj *Inter Ni Dirite*); presis Øien & Indergaard, Trondheim.

Krom al la membroj ni sendis *Norvega Esperantisto* al 2 (4) norvegaj kaj 3 (8) eksterlandaj pagantaj abonantoj, 1 (1) norvega kaj 11 (14) eksterlandaj donacabonantoj, ni sendis ĝin senpage senpage al 4 (4) norvegaj kaj 25 (26) eksterlandaj ricevantoj, kaj interŝanĝe al 19 (19) eksterlandaj eldonantoj de Esperantaj periodaĵoj. Ni sendis la gazeton papere kaj senpage nur al la najbaraj landaj asocioj.

Retlistoj

- teni la retpoŝtlistojn *NEL-diskut* kaj *NEL-inform* aktivaj

La retpoŝtliston por membroj, *NEL-inform*, administris Jardar E. Abrahamsen tra servilo ĉe *Nettverksgruppa*. Per ĝi estas atingeblaj 64 membroj (66), kaj sendiĝis 61 (67) mesaĝoj.

La diskutliston NEL-diskut, malferman por ĉiuj, administris Jardar Eggesbø Abrahamsen. Sendiĝis 11 (12) mesaĝoj.

Raportoj kaj cirkuleroj

- postuli jarraportojn de la lokaj societoj

Laŭstatutajn jarraportojn pri 2010 sendis la kluboj de Bergen, Oslo, Tromsø kaj Trondheim.

Nur Oslo eldonas propran kluban bultenon. La kluboj de Oslo, Sarpsborg, Stavanger kaj Trondheim havas retpaĝojn en TTT.

La klubo de Oslo kunvenis proksimume ĉiun duan semajnon krom en feriaj periodoj. La Esperantoklubo de Bergen kunvenis ĉiumonate escepte dum la somera sezono. La kunvenoj okazis en neformala formo. Dum la aŭtuna sezono la klubo pro diversaj kialoj nur sukcesis havi tri kunvenojn. Grupo Esperantista de Trondheim kunvenis ĉiun duan semajnon krom somere, kaj ankaŭ aranĝis velŝipan ekskurson kaj du festojn. La klubo en Tromsø kunvenis neregule. La aliaj kluboj ne raportis pri siaj aktivecoj.

- informi la membrojn pri la agado de la estraro

La estraraj protokoloj afiŝiĝis en niaj retpaĝoj, kaj la membrogazeto peris la plej gravajn aferojn.

La estraro kunlaboras kun la klubo kiu gastigos la Landan Kongreson 2011, celante ke la 100-jariĝo de NEL en 2011 estu celebrata en taŭga maniero.

La klubo de Tromsø faris la plejmulton el la aranĝaj taskoj, kaj la komunikado kun la Liga estraro fluis glate.

Ĉ. Aliaj projektoj kaj aplikoj

Vortara projekto

La estraro prioritatas havigi monon por akceli pluevoluigon de la vortara datumbazo.

En 2010 ne okazis vortara laboro, ĉar la responsulo pri la praktika laboro ne plu laboras pri la tasko. Tio ŝuldiĝas parte al lia laborsituacio, kaj parte al la kvalitoj de la vortara materialo. Netan raporton ni ankoraŭ atendas.

Turismo

Oslo havas unu rajtigitan Esperanto-parolantan gvidiston (ĉiĉeronon), Kari Kalsås.

D. Administrado

Retservilo

La retservilon formale posedas Akademisk esperanto-forum en Trond-heim, kaj ĝi situas en la oficejo de Jardar E. Abrahamsen, kiu ĝin administras.

Je problemoj pri retkonekto kaj (ĝis novembro) alta temperaturo sendiĝis aŭtomate tekstmesaĝo al la poŝtelefono de Jardar Eggesbø Abrahamsen.

Dum 2010 oni devis dufoje ĝisdatigi la operaciumon kaj la programaron pro postuloj de la retposedanto (la universitato de Trondheim, NTNU).

La oficejo

En la oficejo en Oslo deĵoris ĉefe Douglas Draper, kiu ankaŭ respondecis pri arĥivado.

La estraranoj troviĝas tra la tuta lando, kaj preskaŭ la tuta komunikado inter ili okazis per Interreto.

Teknikaĵoj
La formalan komputilan respondecon de NEL havis Ulf Lunde (Os en Hordaland). Herman Ranes en Trondheim asistis pri komputilaj kaj telefonaj praktikaĵoj.

La Esperanto-Domo (Esperantonia)
NEL posedas duonon de Esperantonia, kaj la Oslo-klubo posedas same multe. La posedantoj dividas inter si la loĝkostojn. En 2008 NEL ofertis al la Oslo-klubo, ke tiu ricevu 60% de ĉiuj luig-enspezoj de Esperantonia, dum la Ligo ricevu 40%, ĉar la Oslo-klubo faras la praktikajn aranĝojn pri luigado. La aranĝo validis en 2008 kaj 2009, kaj ni ankaŭ decidis rekonsideri la aranĝon post la fino de la periodo. En 2010 la estraro de NEL decidis daŭrigi la aranĝon por 2010 kaj 2011.

Membrostatistiko por NEL en 2010
En 2010 NEL havis 9 aliĝintajn klubojn. La membronombroj estis en 2010 (2009):

Bergen	13 (12)
Bryne	9 (8)
Hamar	3 (6)
Kristiansand	2 (1)
Oslo	74 (72)
Sarpsborg	7 (7)
Stavanger	6 (6)
Tromsø	19 (18)
Trondheim	19 (20)
Sume	152 (150)
Rektaj	32 (34)
Membroj entute	184 (184)

Eliris 14 (18) membroj kaj mortis 2 (2) membroj. Ni ekhavis 13 (3) novajn membrojn, kaj 3 (4) malnovaj membroj remembriĝis.

Membroj laŭ kategorioj:

Klubanoj:	
Ordinaraj	96 (97)
Junulaj	28 (24)
Samdomaj	11 (11)
Dumvivaj	17 (18)
Rektaj:	
Ordinaraj	24 (27)
Junulaj	3 (1)
Samdomaj	0 (0)
Dumvivaj	5 (6)

El la novaj membroj 10 estas junuloj, kaj el tiuj 9 membriĝas en la Oslo-klubo.

Ekonomio
En 2010 la ĉefkalkulo de NEL montris profiton de 8277 kr. Tio estas multo: En 2010 ne estis multaj neordinaraj elspezoj, kaj ni sukcesis luigi Esperantonia, nian oficejon en Oslo. Ni ankaŭ ricevis multajn donacojn.

NEL ricevis 8373 kr donace en 2010. El tiu sumo 4000 kr estis por la propaganda fondaĵo, kaj 4373 kr iris al la ĉefkalkulo de NEL. Parto de la donaco al la propaganda fondaĵo estis dediĉita al nova broŝuro kiun NEL planas eldoni kiom eble plej rapide. Ni elkore dankas pro la donacoj! Ili estas bona helpo al la ekonomio de NEL.

Luigo de Esperantonia donis al NEL kaj la Oslo-klubo 13 000 kr de Smyrna Evangeliegruppe kaj 2400 kr de kunvenoj de kunposedoj de la najbaraj domoj. La enspezoj pro luigo estas distribuataj per 60% al la Oslo klubo kaj 40% al NEL, kio en 2010 donis 9240 kr al la Oslo-klubo kaj 6160 kr al NEL. Tiu distribuo estas ĉar la Oslo-klubo havas la praktikan laboron rilate al la luigo de la ejo.

En 2010 ni ĉesigis la specialan aranĝon pri redukto de la domluo de 15 200 kr al 12 200 kr per mono kiun NEL ricevis de la estinta eldonejo. En 2010 la domluo de kaj NEL kaj la Oslo klubo estis po 15 200 kr. La sumo en la domkonto kreskis per 2374 kr, kaj la domkonto do estas proksimume en ekvilibro se ni konsideras ke povos veni eksterordinaraj elspezoj dum la venontaj jaroj por riparoj kaj plibeligoj de la ejo. En 2010 estis neniuj eksterordinaraj elspezoj por Esperantonia.

La valoro de niaj fondusoj en Skagenfondene kreskis. La valoro de Skagen Vekst kreskis per 5095 kr, kaj la valoro de Skagen Høyrente kreskis per 1553 kr., entute la kresko estis 6648 kr.

Proksimume 1/6 el la kresko estis transigita al la propaganda fondaĵo, 1/6 al la instrua fondaĵo, 1/4 al la domfondaĵo kaj la resto al la ĉefkalkulo de NEL.

Legaco Rolf Uhlen
De la komenco la legacon administris Norvega Esperantista Ligo kaj Norvega Esperantista Fervojista Asocio (NEFA) kunlabore. La reprezentantoj de NEL en la legaca estraro dum 2010 estis Bjarte Kaldhol kaj Arne Olav Mjøen, kun anstataŭantoj resp. Ester Olsen kaj Torstein Kvakland.

Dum 2010 NEFA lasis la legacan laboron al NEL. Kvankam la statuto de la legaco permesas al la anstataŭantoj de unu organizo anstataŭi la reprezentantojn de la alia, la ŝanĝoj de la realaĵoj en praktiko ankaŭ postulas ŝanĝojn en la statuto de la legaco. La estraro de NEL laboras pri la afero.

Norvega Junularo Esperantista
La estraro de NJE estis dum 2010:
Leif Arne Storset, prezidanto
Matias Särkelä Jentoft, vicprezidanto
Einar Faanes, sekretario
Kristoffer Haug, kasisto
Odin Hørthe Omdal, estrarano
Espen Stranger-Johannessen, estrarano
David Welsh, estrarano

En 2010 la estraro elektis Einar Faanes kiel komitatanon A por TEJO, ĝi is la venonta elekto en 2012. Kunlabore kun la Oslo-klubo NJE aranĝis renkontiĝon kun muziko kaj picoj. NJE ankaŭ organizis ekskurson al kabano en Streptokåken en Lommedalen, kaj kafejan renkontiĝon en Oslo. En 2010 NJE havis 31 membrojn (25 en 2009).

Biblioteko
Centra responsulo pri la biblioteko estas Douglas Draper. La ĉefa libra kaj revua kolektoj estis stokitaj en la biblioteka domo en Hamar. Tamen en Hamar la komunuma biblioteko mem bezonas pli da magazena spaco, kaj petis NEL forigi siajn librojn kaj revuojn.

La estraro ne volis lokigi amason da libroj en Esperantonia, sed decidis forsendi laŭeble multajn librojn al la Nacia Biblioteko en Mo i Rana. Tamen, specialajn, valorajn librojn ni volas mem konservi.

Dum la aŭtuno Douglas Draper, Espen Stranger-Johannessen kaj Sverre Opsahl finpakis niajn librojn en la biblioteko de Hamar. 30 skatolojn oni transportis al Esperantonia, 45 sendiĝis al la Nacia Biblioteko en Mo i Rana. Pri la projekto ankaŭ multe laboris Cato Haugen kaj Kjell Peder Hoff.

Studenta Esperantosocieto
NEL kaj la Studenta Esperantosocieto (en Oslo) daŭre havas bonajn rilatojn.

Kunlaboro kun NEFA
Norvega Esperantista Fervojista Asocio (NEFA) kaj NEL kunlabore administris la Legacon Rolf Uhlen dum multaj jaroj. En 2010 NEFA en praktiko ĉesigis sian laboron, vd. la punkton pri Legaco Rolf Uhlen pli supre.

Internacia organizo
Komitatano A de UEA estis Torstein Kvakland. Li sekvas la diskutojn en la komitata retpoŝta listo kaj en nia propra estrara listo.

Ĉefdelegito de UEA estas Agnar Fitjar.

Li peris informon de UEA pri 33 membroj de NEL kiuj estis individuaj membroj de UEA en 2010 (en 2009 estis 37, sed la tiama jarraporto erare diris 43). Aldone 6 membroj de NEL estis dumvivaj membroj de UEA kaj estis 1 honora. 6 NEL-anoj (pasintjare 3) estis membroj de Societo Zamenhof.

Universala Kongreso
Turisma Servo de NEL (responsulo Agnar Fitjar) akceptis kongreskotizojn. 8 norvegoj aliĝis al la UK en Havano (2009 en Bjalistoko: 18).

Kunlaboro kun ne-Esperantaj organizoj
NEL estas membro de la studasocio *Populus – studieforbundet folkeopplysning*. En la jarkunveno reprezentis NEL-on Douglas Draper. Cato Haugen sidis en la elekta komisiono 2009–10.

Aliaj organizoj
Norvega pacocentro kunfandiĝis kun Nansen Dialog en la lernejo Nansen, kaj oni skizis novan organizan modelon kun fakkonsilio kun individuaj membroj. Laŭ la nova leĝo pri *stiftelser* (2002) organizoj ne plu povas

esti reprezentataj, kaj sekve NEL nun – kune kun pluraj aliaj marĝenaj organizoj – en la praktiko elfalis. Douglas Draper reprezentis NEL-on en la lasta konsilia kunsido de Norvega pacocentro en februaro.

La estraro dum 2010

- prezidanto: Jardar Eggesbø Abrahamsen
- vicprezidanto: Ulf Lunde
- sekretario: Ingebjørg Rambjør
- kasisto: Anne Karin Bondhus
- estrarano: Asbjørn Lindh
- estrarano: Geir-Arne Paulsen
- anstataŭanto 1: Eli Eriksen Fitjar
- anstataŭanto 2: Arne Olav Mjøen

E. Konkludo

La drasta kaj plurjara malkresko de la membraro ŝajnas esti atinginta sian finon, aŭ almenaŭ ripozon dum 2010. Ni ankaŭ tre ĝojas ke la junuloj iĝas pliaj. Dum 2010 ni ankaŭ havis enspezojn pro luigo de Esperantonia, kaj kune kun donacoj tio donis relative grandan profiton.

La membrogazeto daŭre estas altkvalita kaj aperadis regule. Sed la manko de homaj fortoj kaŭzis ke ne okazis seminario en 2010, ke ne produktiĝis nova broŝuro, kaj ke la ekstera informada laboro ĝenerale lamis.

Ankaŭ la vortara laboro lamis, kaj nun pli definitive ol antaŭe. Tiun projekton pritaksos la estraro kiam ĝi estos ricevinta la raporton kaj rekomendojn de la ĝisnuna responsulo.

Sen pli da laborkapacito ne eblas entrepreni grandajn projektojn. Tamen la organizo ankoraŭ havas vivfortojn, kaj kelkaj kluboj vigle aktivas inspirante unu la aliajn. Esperon donas ankaŭ la ĉi-jara plistabiliĝo de la membronombro.

La 31an de decembro 2010/ la 21an de marto 2011.

La Liga Estraro

Jardar Eggesbø Abrahamsen

Ulf Chr. Lunde Anne Karin Bondhus

Ingebjørg Rambjør Asbjørn Lindh Geir-Arne Paulsen

Eli Eriksen Fitjar Arne Olav Mjøen